
Aperas sesfoje jare. Jarabono 55 steloj aŭ 4,50 us.dol. aŭ 75 din.

ENHAVO:

- A. Albault*: Unika konflikto inter niaj du Fundamentoj
B.V. Tokarev: Klasifiko de ĥemiaj transformiĝoj de atomoj
B. Popoviĉ: Kalkulado de la moviĝo sen la sekulaj membroj

UNIKA KONFLIKTO INTER NIAJ DU FUNDAMENTOJ

(A. ALBAULT, TOULOUSE, FRANCIO)

Oni bone scias, ke la "Fundamento de Esperanto", agnoskita kiel tia en Bulonjo ĉe Maro en la 1905., ne estas nia unua fundamento. Tia, fakte, antaŭe estis la Unua Libro el la 1887.

Efektive jam en diversaj eldonoj de la Unua Libro (1887. kaj postaj jaroj) Zamenhof nete aludas, ke post unujara tempopaso kaj eventuala korektado de eraroj, tiu verko estos fundamento de la lingvo: oni ĝin ne plu diskutos, sed sur ĝi ĉiu laboros en sia angulo kaj laŭ sia maniero.

En la Aldono al la Dua Libro (188.) Zamenhof deklaras jenon: "Por ke lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi ... oni devis krei komunan fundamenton ... Tia komuna fundamento ... devas esti mia unua broŝuro (Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro)."

Disciplino kaj obo al tiu unua kerno de la lingvo, krom multflanka laborado de la unuaj pioniroj, klarigas kial nia movado iom post iom disvastiĝadis. Baldaŭ poste aldoniĝis al tiu kerno la Ekzercaro kaj la Universala Vortaro. Tiuj du verkoj kune kun la Plena Gramatiko, parto de la Unua libro fariĝis en 1905. la tri esencaj partoj de nia bone konata Fundamento^{1/}.

Sed se oni volas detale rigardi la aferon, tio signifas, ke en la unua Fundamento mankas el la Unua Libro ĉio, kio ne estas la Plena Gramatiko mem; nome, la "Malgranda Vortaro" de 917 aŭ 921 elementoj, laŭ la eldonoj, la ses tekstetoj en Esperanto kaj la diversaj ekzemplaj vortoj en la antaŭparolo.

Tamen praktike la diferenco estas ne tiel ampleksa, ĉar ĉiuj vortoj de la Malgranda Vortaro reaperas, kun unu escepto, en la Universala Vortaro, dum la aliaj vortoj, kun kelkaj esceptoj, aperas ĉu en U.V., ĉu en unu el ĝiaj Oficialaj Aldonoj. La vortoj, kiuj ankoraŭ ne estas oficialigitaj estas: *desinfekti*, pri kiu ni ankoraŭ parolos, *amen* el la unua teksto, *Heine'* (kun apostrofo) en la titolo de la kvina teksto, *korono* en la Malgranda Vortaro, verŝajne plurmeraro por *krono*, aperanta en la poezio de Heine; cetere tiu formo nun estas reuzata kiel teknika termino. Krom la propra nomo Heine, la tri aliaj vortoj aperas en la vortaroj kaj ne prezentas problemon. Sed mi konservas la kvinan por la fino; temas pri *platino*, kiu konflikta kun *plateno* de la Fundamento. Jen punkto, kaj ŝajne ĝi estas la sola, por kiu la du fundamentoj, tiu el la 1887. kaj tiu el la 1905. ne interakordas. Al tiu afero ni dediĉas la nunan artikolon. Kiu el la du formoj devas havi superecon? Ĉu la unua, kun kiu kreiĝis la lingvo; ĉu la dua, kiu estis nerimarkite akceptita en la 1905.? Neniu povos respondi al tiu demando; neniu krom la publika opinio.

*
* * *

Ni precizigu la faktojn. Jen la Zamenhofa teksto, kiu aperis unue nacilingve en la diversaj eldonoj de la Unua Libro (proksimume sur la paĝoj 10 aŭ 11), kaj due en la Fundamenta Krestomatio tradukita de Zamenhof mem (eld. 1/16 sur p. 247; eld. 17 sur p. 233):

"Krom tio mi donis komunan regulon, ke ĉiuj vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj (la tiel nomataj "fremdaj vortoj"), restas en la lingvo internacia neŝanĝataj, akceptante nur la internacian ortografion; tiamaniere grandega nombro da vortoj fariĝas superflua por la lernado; ekzemple: *lokomotivo, redakcio, telegrafo, nervo, temperaturo, centro, formo, publiko, platino, botaniko, figuro, vagono, komedio, ekspluati, deklami, advokato, doktoro, teatro k.t.p., k.t.p.*"

Tiu teksto entenas 18 ekzemplojn de internaciaj - aŭ "fremdaj" - vortoj. Sed en la diversaj eldonoj tiuj ekzemploj estas iom malsimilaj. Pro tio estas interese ilin kompari, dank'al la tabelo ĉi-apuda, kiu registras entute 24 malsamajn vortojn.

La unua rimarko, kiu sin trudas, ke eblas dubi pri la fakta internacieco, ĉar relative multaj vortoj ne aperas en ĉiuj lingvoj: ĉu eble oni iom hazarde deklaris internaciajn vortojn, kiuj ne estas tiaj? Neniel! Efektive, ni unue konsideru, ke la franca teksto aldonis kvar pliajn vortojn, kaj la germana du pliajn (sekvata en tio de la sveda):

F. *atome*: R.Pl.G.A.Sv. *atom*.

F. *desinfector*: R. *dezinficirati*, Pl. *dezynfekować*, G. *desinfizieren*,
A. *to disinfect*, Sv. *desinficiera*.

F. *émanciper*: R. *èmansipirovati*, Pl. *emancypować*, G. *emanzipieren*,
A. *to emancipate*, Sv. *emancipera*.

F. *monopole*: R. *monopoliâ*, Pl. *monopol*, G. *Monopol*, A. *monopoly*, Sv. *monopol*.

G. *Astronomie* (Sv. *astronomi*): R. *astronomiâ*, Pl. *astronomia*, F. *astro-*
nomie, A. *astronomy*.

G. *Motiv* (Sv. *motiv*): R. *motiv*, Pl. *motyw*, F. *motif*, A. *motive*.

Aliparte la pola kaj la germana (plus la 'sveda) forgesis po unu vorton: Pl. *publiczność* kaj G. *Theater* (Sv. *teater*). La franca formetis kvar: *avocat*, *centre*, *déclamer*, *exploiter*, kaj la angla eĉ sep: *advocate*, *botany*, *to declaim*, *doctor*, *to exploit*, (*redaction*), *theatre*.

Se do oni tiel kompletigas la tabelon oni konstatas, ke vere temas pri 24 internaciaj vortoj. Eble konvenas fari escepton por la angla *redaction* kiu ne havas ĝuste la saman difinon kiel en aliaj lingvoj? Sed ŝajne estus la nura manko: eĉ la vorto *desinfekti* estas multe pli laŭforme internacia ol aperas; efektive sufiĉas konsideri la tradukon ne de la verbo, sed de la substantivo por trovi perfektan unuanimecon: F. *désinfection*, R. *dezinfekciâ*, Pl. *dezynfekcja*, G. *Desinfektion*, A. *disinfection*, Sv. *desinfektion*.

Ni do povas diri, ke en ĉiuj tiaj vortoj, krom sensignifaj detaletoj, sufiĉas forigi la naciajn finaĵojn, ja tre diversaj, kaj anstataŭe almeti la Esperantajn por ricevi niajn bone konatajn vortojn.

La dua rimarko estas, ke krom du vortoj, ĉiuj aliaj aperas aŭ en la Oficialaj Aldonoj (Unua kaj Dua), aŭ en la Universala Vortaro (3 el la Oficialaj poste estis agnoskitaj kiel Fundamentaj). La du mankantaj estas *desinfekti*, kiu sendube tuj meritis oficialigon, kaj *platino*, kiu bedaŭrinde estas tutsimple alia formo de la Fundamenta *plateno*. *Platino* kiu nedubeble respondas al la formoj troveblaj en la diversaj lingvoj de la Unua Libro, kaj nedubeble, kiel montras la kunteksto, estas la formo rekomendita de Zamenhof mem. Li eĉ tiel rekomendis ĝin, ke kiam li tradukos tiun Unuan Libron por ĝin aperigi en la Fundamenta Krestomatio (1903.), li ja uzos la formon *platino*. Pli poste, okaze de la 5-a eldono de tiu verko, li korektos diversajn erarojn, okaze de kio, premita de la neceso doni ekzemplon,

li oferis la *viperon* kaj ŝanĝis ĝin al *vipuro*^{2/}; sed tiam, notu bone, li neniel tuŝis la senkulpan *platinon*, kiu restas tia ĝis hodiaŭ, eĉ en la nova 17-a eldono: eĉ ne piednoton aldonis Bailey kaj Downes! Cetere tiel same agis Setälä, kiam li fotorepresis la Unuan Libron kaj aldonis la plenan tradukon, ankaŭ li lasis *platino*!

Aliparte, ŝajnas, ke Zamenhof neniam havis la okazon uzi tiun vorton. Per letero de 13 FEB 67, Pastro Downes skribis al mi: "Mi turnis min al la sliparo de Wm. Bailey kaj trovis, ke ĝi konfirmas vian diradon, ke *platen'* okazas nur en la Universala Vortaro, kaj *platino* nur en F.K. 247/20."

Resume ni troviĝas antaŭ du formoj, kiujn Zamenhof ne havis la okazon uzi aliloke ol en ĝuste kaj respektive la Fundamento el la 1887. kaj la Fundamento el la 1905. Kial li enmetis devian formon en la Universalan Vortaron? Por korekte respondi necesus respondi al jenaj du demandoj: kiu kompilis la U.V.? kaj kial estas devioj de internaciaj vortoj je *in-* (bobeno azeno, ... kaj eĉ faruno)? Al la unua demando verŝajne neniu estas preta respondi, kvankam ekzemple mi ĉiam trovis iom mistera la fakton, ke kuracisto mistradukis la vorton *artrito* en la U.V.! Pri la dua demando mi intencas iam en la venonteco prezenti studon, kiu povus utili ekzemple por la elekto de novaj formoj (por novaj konceptoj) el tiu kategorio de internaciaj vortoj finiĝantaj per *in-*. Do hodiaŭ mi pli modeste limigos min al studo de la internacieco kaj etimologio de la vorto *platino/plateno*.

*
* *
*

Kia estas la internacieco de *platino/plateno* ?

Nu, la tri ĉefaj sciencaj lingvoj posedas iom malsamajn formojn, se oni atentigas la finaĵojn: A. *platinum*, F. *platine*, G. *Platin*, dum la hispana kaj itala (same kiel la kataluna kaj la okcitana) havas *platino*. Tamen la granda plimulto de lingvoj atestas la formon *platina*: ne nur la portugala, la rumana (*platină*) kaj la romanĉa, sed ankaŭ ĉiuj slavaj: rusa, bulgara, ĉeĥa, slovaka, serbo-kroata, pola (*platyna*), same kiel ankaŭ la sveda kaj la nederlanda (kaj la indonezia!), la greka, kaj eĉ ankaŭ la hungara kaj la finna! Kelkaj sekvas la germanan *Platin* - kiu mem cetere sekvis la francan - , nome: la dana, la letona (*platīns*) kaj eĉ la fora armena.

Parenteze, estu permesite rimarki la superecon de la sistemo proponita de Zamenhof per kiu substantivo estas markita per fina -o! "Kleruloj" mokas tian simplisman sistemon, sed kion ili povas proponi? Ĉi tie ili povas proponi kalkuladon de la pli granda internacieco, kaj ili alprenas finaĵon -a, aŭ ili volas atenti nur la latinidajn lingvojn: itala (-o), franca (-e) kaj grupo hispana-portugala (-o kaj -a), el kiu rezultas -o. Kiu ne povas fari tiun traserĉadon dubos, hezitos kaj eraros. Ĉiuj devos lerni speciale la finon de ĉiu vorto! Sed ni revenu al niaj bredataj ŝafoj!

Fakte la fonto de ĉiuj ĉi formoj estas la arkaika hispana *platina*, kiu ĝuste tia estis unue transprenita en la angla, kaj kiu naskis en la franca same ingenran vorton, nome *platine*, kiel kutimas por la hispanaj a-vortoj enirantaj en la francan. Poste pro altiro de la aliaj metalnomoj, ĉiuj virgenraj, la franca vorto iĝis virgenra. Cetere tiel same okazis en la hispana, poste imitita de la kataluna kaj itala: en ili la vorto fariĝis virgenra kaj do alprenis la formon *platino*. Plej verŝajne simila fenomeno okazis en la angla kiu alprenis la latinan neŭtran finaĵon: *platinum*.

*

* * *

La hispana vorto *platina* ŝajne estis kreita de Antonio de ULLOA (1716-1795), hispana maristo kaj sciencisto, Naskita en Seviljo, li defendis en la 1740. Gvajakvilon kontraŭ la Angloj, estis guberniestro de Luiziano en la 1766. kaj ĝenerala komandanto de la hispana floto en la 1767. Sed li estas konata ankaŭ kiel partopreninto de la komisiono de Condamine, kiu havis la taskon mezuri en Ekvadoro unu gradon de tera meridiano (1735). Li ankaŭ kreis la observatorion de Kadizo kaj direktis hidrargajn minejojn de Almadeno.

Platino sufiĉe similas al arĝento: preskaŭ same tiel blanka, tamen apenaŭ pli grizeta, same tiel duktila kaj maleebla, sed duoble densa ($d = 21,4$ kontraŭ $10,50$) ĝi fandiĝas ĉ. 1750° C kontraŭ nur 950° ; ĝi plie ne estas aliigebla en aero au per acidoj. Ofte maksita al aliaj metaloj, kiel ekz-e iridio, platino troviĝas en pli etaj kvantoj ol arĝento kaj multe pli kostas.

Ulloa komparis platinon al arĝento kaj - en la hispana - nomis ĝin arĝenteto: *platina* estas diminutivo de *plata*, arĝento.

Siavice *plata* devenas de olda franca *plate*, kiu i.a. nomis martelitan metallamenon, ofte el arĝento, kaj kiu mem devenis de malfrua latina *platta*, metalplato, parenca kun *plattus*, plata.

*
* *
*

Sekve, samorigine estas la alia franca vorto *platine* (ingenra kontraste al la virgenra nomo de la metalo!). Ĝi propre signifas *plateto* kaj estas ia diminutivo de la franca *plat*, plata. Per ĝi oni nomas iajn platajn pecojn de diversaj instrumentoj, aparatoj aŭ maŝinoj: ekz-e: mekanismo-plateto en horloĝo; plateto subportanta la vitran lameton kun la preparaĵo en mikroskopo ("objekto-plato"); serurplato tra kiu pasas la ŝlosilo; plateto en pafilo: ĝi subportas la perkutorganojn; ŝtallameno en la tenilo de tranĉilo posedanta risorton; plataĵo de tipografia maŝino, ... ktp ...

Por tiuj diversaj signifoj iuj volus enkonduki la neologismon *platino*!! Bedaŭrinde tiu termino havas tre limigitan internaciecon: la hispanoj transprenis tiun francan vorton, lasante ĝin ingenrado: *platina*. Tiu neologismo estus do jam iom konfuziga por hispanoj. Sed kion diri pri la angloj, por kiuj *platen* havas unu el la sencoj de la franca *platine*, nome tipografia plato, kaj plie signifas il-maŝina plataĵo (F.plateau!). Por ili *platen* estus platino kaj la metalo *platinum* estus plateno!!

Ŝajne la sana prudento rekomendas en tiaj kondiĉoj absolute eviti tiun elfrancan neologismon (enkondukitan de Véraz 1910.): ĝi prezentas preskaŭ nenan internaciecon, francoj, angloj kaj hispanoj ne donus al ĝi la saman nocio-amplekson kaj ĝi kolizius kun la absolute internacia nomo de la metalo. Cetere ĝiaj diversaj signifoj estas facile redoneblaj plej ofte per *plateto*, aŭ se nesece kaj pli precize per diversaj aliaj derivaĵoj de *plato*, kiel *plataĵo*, *plataĵeto* aŭ eventuale eĉ *platumo*. Angloj uzas por tiu nocio: *lock*, *stage*, *plate*, *platen*; germanoj - *Schlossblech* kaj ĉefe *Platte*; hispanoj: - *cuadro*, krom *platina*; italoj - *lamiera*, *cartella*; ktp.ktp.

Feliĉe tiu netaŭga neologismo neniam estis vaste akceptata: ĝi estas menciita en neniu el la cefaj lastatempaj vortaroj.^{3/}

*
* *
*

Restas lasta demando: ĉu la formo *platino* estis uzata por la metalo? Jes, certe, sed ne tre multe.

Teknika vorto, ĝin uzas preskaŭ nur sciencistoj kaj kemiistoj: tiuj ne multnombras en niaj vicoj. Do estas tute vane paroli pri tradicio ĉe vorto apenaŭ uzata. Eblas nur diri, kion mi jam diris, ke la sciencistoj kaj kemiistoj, en siaj naciaj lingvoj kaj en ĉi-

uj lingvoj, kiujn ili bezonas uzi pasive aŭ aktive, konas nur unu radikon, nome *platin-*, dufoje rekomenditan cetere de Zamenhof en la 1887. kaj 1903. kiel internacian!

En la "Esperanta Nomenklaturado de Kemio kaj Vortaro de Kemio" (ISAE, Paris, 1913) troveblas sur p.1-2 listo de elementoj. Inter ili kuŝas *Pt: platino*. Noto sur la paĝo 1 precizigas: "Ni alprenis *platino* anstataŭ *plateno*, kiu troviĝas en la Fundamento, kaj kiu ne estas internacia. Laŭ la konsilo donita de ni, en la Konsilaro, ni prezentos proponojn rilatajn al tiuj du vortoj, al la Akademio", Ni aldonu, ke ni ne retrovis la nomitan konsilaron, ke la alia vorto estas *arseno*, kiu efektive prenis parton de la signifoj de la Fundamenta *arseniko*. Tamen verŝajne pro la milito ne estis sekvo al tiu klopodo ĉe la Akademio.

Platino troviĝas ankaŭ en la Germana-Esperanta Vortaro de Christaller (1923.) sur p.389, kaj tie ricevas preferon antaŭ *plateno*; la fonto krome estas indikata: Oficiala Gazeto.

Fine, tre certe multaj aŭtoroj uzis tiun formon, konstatinte ĝian internaciecon. Tiel ekz-e mi hazarde renkontis ĝin en "Lingvo Internacia" de Prof.CART, tiu bastiono de la konservativismo (L.I. 07,p.548). Kaj ne povas esti alimaniere: *platin-* ĝuas absolutan internaciecon kaj ne apartenas al la ĉiutaga vortprovizo, sed nur al la faka, speciala, scienca.

* * *

Estas nun facile konkludi: unuflanke nepre evitu la neologismon *platino* kaj preferu klarajn vortojn esperantajn, kiel *plato*, *plateo*, *plataĵo* ktp... Aliflanke memoru ke Zamenhof dufoje rekomendis la metalnomon *platino*, ĉar absolute internacia. Ial envenis la formo *plateno* en la Universalan Vortaron kaj tial ĝi estas Fundamenta. Tiuj du vortoformoj estas la sola konflikto ekzistanta inter la du fundamentoj: tiu de la 1887. kaj tiu de la 1905.

1/ Por pli da detaloj vidu la "enkondukan noticon" al la 9-a eldono de la Fundamento de Esperanto (Esperantaj Francaj Eldonoj, 1963.).

2/ Vidu mian artikolon: La fundamenta esperanto, en Scienca Revuo, 18, n^o 3, p.81-88 (10 SEP 67).

3/ Ĝi nun aperis en PIV, bedaŭrinde.

TABELO DE LA EKZEMPLOJ DE INTERNACIAJ VORTOJ EL LA DIVERSAJ ELDONOJ DE LA UNUA LIBRO (1887-89)

	R.	Pl.	F.	G.	A.	Sv.	F-ta Kr.
1	advokatù	advokat	-	Advokat	-	advokat	advokato 1.
2	-	-	-	Astronomie	-	astronomi	- 1.
3	-	-	atome	-	-	-	- 1.
4	botanika	botanika	botanique	Botanik	-	botanik	botaniko 1.
5	centr	centr	-	Centrum	centre	centrum	*centro 1.
6	deklamirovati	deklamować	-	declamiren	-	deklamera	deklami 1.
7	-	-	désinfecter	-	-	-	- 1.
8	doktorù	doktór	docteur	Doctor	-	doktor	*doktoro 1.
9	eksploatirovati	eksploatować	-	exploitiren	-	exploitera	eksploati 2.
10	-	-	emanciper	-	-	-	- 1.
11	figura	figura	figure	Figur	figure	figur	*figuro. 1.
12	forma	forma	forme	Form	form	form	*formo. 1.
13	komedîa	komedja	comédie	Komödie	comedy	komedj	komedio 1.
14	lokomotivù	lokomotywa	locomotive	Locomotive	locomotive	lokomotiv	*lokomotivo. 1.
15	-	-	monopole	-	-	-	- 1.
16	-	-	-	Motiv	-	motiv	- 1.
17	nervù	nerw	nerf	Nerv	nerve	nerv	nervo 1.
18	platina	platyna	platine	Platin	platinum	platina	platino 1.
19	publika	-	public	Publicum	public	publik	*publiko. 1.
20	redakciâ	redakcja	rédaction	Redaction	-	redaktion	*redakcio. 1.
21	teatrù	teatr	théâtre	-	-	-	*teatro 1.
22	telegrafù	telegraf	télégraphe	Telegraph	telegraph	telegraf	*telegrafo 1.
23	temperatura	temperatura	température	Temperatur	temperature	temperatur	temperaturo 1.
24	wagonù	wagon	wagon	Wagon	waggon	wagon	*wagono. 1.

Tiu tabelo donas ekzemplojn de internaciaj vortoj, kiujn Zamenhof donis en diversaj eldonoj de la Unua Libro. La ses unuaj kolumnoj donas ilin (laŭ ordo de publikigo) en la eldonoj rusa (R.), pola (Pl.), franca (F.), germana (G.), angla (A.) kaj sveda (Sv.). La sepa kolumno donas tiujn ekzemplajn vortojn, kiuj aperas en la Zamenhofs traduko en la Fundamenta Krestomatio; plie, antaŭa asterisko signifas, ke la vorto enestas, en la Universala Vortaro, dum la posta (aŭ sola) cifero 1 aŭ 2, ke ĝi (aŭ la koncerna traduko de la naciaj vortoj) enestas en la Unua aŭ Dua Oficiala Aldono.

Ni respektis la ortografion, kiun ni trovis en la diversaj eldonoj de la Unua Libro: oni scias, ke la rusa, pola kaj germana de tiam subĝis al pli-malpli ampleksaj reformoj. Por la rusa ni uzis la transskribon, kiun ki klarigis en Sci.Rev., N^o 4 p.135-140. Oni notu, ke en la 1917. la litero ù estis forigita de ĉiuj vortoj.

La kvar unuaj eldonoj de la Unua Libro (R., Pl., F., G.) estas aŭtente Zamenhofaj. La angla tamen estas laboro de irlandano, kiu vivis ĉefe en Usono kaj Alasko, nome Geoghegan; dum la svedan preparis G. Henriclundquist plej verŝajne laŭ la germana eldono.